# Saluton!

Bulteno de la Esperanto-Societo de Ŝikago № 7 Julio, 2016

*Karaj legantoj, jen estas mezsomera numero de nia bulteno, en kiu vi trovos raportojn pri du lastaj E-eventoj: nia tradicia pikniko kaj NASK-2016. S-no Hanso proponas organizi Nordusonan samtempan kunvenon ankaŭ en Ŝikago, li eĉ trovis lokon por ĝi.*

*Fine, ni deziras sukcesan kongresumadon al niaj klubanoj, kiuj partoprenos UKon en slovaka Nitro!*

–La Redaktoro

## Raporto pri NASK



Pluvegis dum mia paŝado el la bushaltejo en la centro de Raleigh al la kampuso (vd la foton). Malseke, mi eniris la loĝejon. Tujtuje la etoso montris sin al mi. Malgraŭ mia malsekeco, unu el la instruistoj varme salutis min kaj donis al mi informojn. Slosiloj enmane, mi trovis mian ĉambron. Je la dek-sesa, mia samĉambrano ekaperis. Koloradano li estis, 24-aĝa kiel mi. Ni interparolis dudek minutojn antaŭ ol li diris al mi, ke tiu estas lia unua konversacio en nia lingvo. Kvankam li serĉis la ĝustan vorton kelkfoje, nia interŝanĝo estis ege agrabla. La etoso pendis en la ĉambro nebule – ju pli da konversacio, des pli da ridetoj.

Mirigis min, kiom da bonkoraj homoj vojaĝis al Esperantujo. La unua vespero, mi renkontis Kubaninon. Mia Usona eduko strebis timigi min per ŝia ekzisto. Malgraŭ la iam malbonaj sentoj inter niaj hejmlandoj, tiam ni sentis bonege. Kun verdaj koroj, batante samtempe, ni interparolis pri niaj esperoj. Ni ambaŭ esprimis dezirojn por paco, amikeco kaj la eblo trovi veron en mondo, ombrigita per mensogoj. Mi sentis pli simila al ŝi ol al la plimulto el miaj samlandanoj. Nur en Esperantujo, mi pensis. Poste, en loka trinkejo, mi ankaŭ amikiĝis kun rondo da pli-malpli junaj Esperantistoj. Biero enmane, ni parolis pri gramatiko, la movado, niaj propraj vivoj kaj niaj esperoj por NASK. Krom mi kaj alia nova Esperantisto de Novjorko, ĉiuj jam partoprenis NASKon. Ili esperis, ke la klasoj kaj instruistoj estos tiel bonaj, kiel en la pasinteco. Mi nur esperis, ke mi povus trovi la ĝustan klason. Sed, multaj NASKanoj konsilis min tiel: “Ceestu la superan. Se ĝi ne taŭgus, vi povus ŝanĝi al la meza.”

La supera taŭgis. Fakte, la spertuloj de Esperantujo estas homoj kiel mi aŭ vi. Ili bone regas la lingvon, sed (kiel ni) eraras iomete. Ili ne komprenis ĉion. En la klasĉambro, eĉ ili cerbe starigis po unu demando pri “po.” Kune, ni povis analizi eĉ la plej malfacilajn gramatikajn problemojn, kaj diskuti ilin detale. Mi komprenis kaj la demandojn kaj ofte partoprenis en la afablaj diskutoj. Pli ol iam antaŭe, mi miris pri la riĉeco de nia lingvo. Mi iomete konis la esprimpovon de Esperanto, sed mi neniam spertis ĝin tiel profunde. Mia ĝojo multobliĝis dum la kurso. Ciutage, ni diskutis aferojn el la “magia ĉapelo” de Bertilo. Gi funkcias tiel: oni demandis Bertilon per slipo enmetita en lian pajlan ĉapelon. Dum la kurso, Bertilo prenis slipojn el la ĉapelo kaj respondis al la demandoj. Kvankam la ĉapelo estis sufiĉe malprofunda, kun slipoj superfluantaj, la respondoj de Bertilo kaj la samklasanoj ĉiam profundigis mian scion. Sed ni ne nur diskutis la demandojn. Unu el niaj plej ŝatataj taskoj estis korekti erartekstojn.

Kelkfoje, ni havis plenan tekston, kaj ŝerĉis erarojn, plejparte gramatikajn. Sed pli ofte ni ekzercis nin en vortelekto per tekstoj sen ĉiu sepa vorto. Tiu tasko estis farinda metodo por konstati mian vortstokon. Kompreneble, ĝi ne estas tiel granda, kiel en la angla. Tamen, mi povis elekti ĝustan vorton dum la ekzerco, eĉ se ĝi ne ĉiam ☞

estis la ĝusta vorto de la originala teksto.

Certe, mi ne estis tiel sperta, kiel multaj aliaj superanoj. Ofte mankis al mi la ĝustan vorton aŭ la perfektigitan stilon. Sed mi partoprenis en la kurso kaj komprenis ĝin entute. Mi amikiĝis kun la aliaj partoprenantoj, ligitaj per nia amo de la lingvo.

Bertilo instruis nin kaj ŝercis kun ni. Eĉ la ununoma akademiano estis afabla, scivola homo. Li vere volis aŭdi niajn lingvajn respondojn. Pro li kaj la formo de la kurso, la supera kurso estis bona elekto por homoj scivolaj pri gramatiko, vortfarado, kaj nuntempaj lingvaj demandoj. Per ĝi, mi riĉigis mian Esperanton kaj plenigis multajn truojn survoje al plena flueco.

La klasoj ĉiam estis bonaj, amuzaj, riĉigaj. Sed la kialoj por partopreni en NASK estas pli grandaj ol la kursoj. Simple, vi povas loĝi en Esperantujo unu semajnon. Eble, homoj krokodilis dum NASK, sed mi malofte aŭdis elbuŝitan anglan de la NASKanoj. La tago estis plenplena de prelegoj, koncertoj, metiejoj, kaj vesperaj eventoj. Ĉio estis en Esperanto. La ununura malbonaĵo estas, ke Esperantujo devas malaperi ekster la koro post la fino de la kurso.

*–Hanso BECKLIN, Estrarano de la Societo*

## E-Pikniko 2016



Mi deiris de Grayslake je la 9a kaj atingis Ŝikagon je la 10:10 danke al mia frato Andreo, kiu volonte veturigis min irrevene senpage. Mi venis frue kaj finfine estis longe atendanta la alvenon de aliaj gesamideanoj. Akurata kiel brakholorĝo, nia afabla redaktoro Viktor sin prezentis kaj ni iris ĉe la lokon,kie okazis la pikniko. Tre luksa loko kun tre bela pejzaĉo estas la parko Cobbler. La evento komenciĝis je la 12:30 kaj finiĝis je la 3:30. Ni trinkis kaj manĝis rostigitajn kolbasojn de nia brava aktivulo Hanso. Ni praktikis la internacian lingvon; Esperanto kaj varma debato okazis pri la uzado de la sufikso 'an' kiel parizano kaj Parizo. Kaj antaŭ ol disiĝi,ni fotis nin kaj el mia patrolando RDKongo, samideanoj petis de mi proponi ĝemeladon kun diversaj kluboj tra la mondo. Mia unua pikniko tre plaĉis al mi malgraŭ tio, ke imagis renkonti multajn partoprenantojn, sed mia plej granda ĝojo estas, ke ĉio okazis pace.

Dankon al la organizantoj! *–Joseph NLANDU LUYALA*

## Nova Evento *de Hanso BECKLIN*

La evento okazos la 20an de Aŭgusto en la najbarejo Hyde Park. Tiun tagon, multaj esperantistoj en Usono kaj Kanado renkontiĝos en pli ol 15 lokoj, kaj la evento estas nomita "Paralela Universo." Cie, la eventoj enhavos du manĝojn kaj tempon por viziti muzeojn, ludi, ktp. Mia celo estas uzi tiun eventon por komenci la novan rondon de komencantoj/junuloj. Tiu evento taŭgos por tiu celo, ĉar la ideo de la evento estas ligi novajn esperantistojn kun la jam fonditaj grupoj/organizoj. Mi esperas, ke mi povos trovi novajn Esperantistojn rete kaj varbi ilin en la rondo. La 20an de aŭgusto, grupo de Esperantistoj renkotiĝos en Hyde Park por sperti la bonan etoson de Esperantujo per manĝoj, muzeoj, kaj ludoj. La evento komencos je tagmezo kaj daŭros ĝis la sepa kaj duono. Trovu pli da informo ĉe Fejsbuko (https://www.facebook.com/events/1266919383320006/) aŭ, se vi ne uzas Fejsbukon, vi povas legi la tutan planon ĉe https://goo.gl/EfQ96d.


**Adreso:**

Esperanto Societo de Ŝikago
p/a Randy Ream
1835 N. Natoma Ave., Chicago, IL 60707
773-262-7738
www.esperanto-chicago.org


**Estraro:**

Prezidanto – D-ro Les Kordylewski
Vicprezidanto – Randy Ream
Eksprezidanto – Viktoro Pajuk
Sekretario – Tina Seastrom
Kasisto – Karlo Gunn
Membro – Hans Becklin

**MEMBROKOTIZOJ**

Membro-subtenanto: $40 jare;
Familia membro: $30,
Regula: $20
Studento aŭ pensiulo: $10.

Gifts are welcome also.
Dues are needed for the routine expenses of the Society and reported on our website.

Check should be payable to the Esperanto Society of Chicago, and mailed to our Treasurer, Charles Gunn
828 S. Ada St, Chicago IL 60607-4105

**SEKVANTAJ KUNSIDOJ**

1350 N. Wells St., Ŝikago. Bonvenon! Apudas stacioj: Sedgwick (Bruna linio) kaj Clark/Division (Ruĝa linio). Por senpaga parkejo bv telefoni al Viktoro: (773) 344-2276. Vi rajtas preni vian ŝatatajn ne-E-amikojn, manĝaĵojn kaj trinkaĵojn (dolĉakvon, bieron, vinon ktp).

**26an de Julio** – Kunsido <u>ne</u> okazos

**23an de Aŭgusto** – La 101-a UK en Nitro

